

Ludwig Lazarus Zamenhof,  
Mein Gedanke

*tradukita de Franz Zwach*

Auf der Flur, in Freundeskreisen,  
Als der Sommertag verklungen,  
Hat ein Mädchen eine Weise  
Von der Hoffnung Trost gesungen  
Und von jäh zerstörtem Leben  
Gab es mitleidsvolle Kunde, -  
Ließ mein Herze neu erbeben,  
Wiederbluten meine Wunde.

Sinnend lag ich unter Bäumen;  
Plötzlich hört' ich spottend fragen:  
„Schlafen Sie, mein Herr, und träumen  
Von entschwundenen Kindertagen?“ –  
Welche Antwort sollt' ich geben?  
Durfst' nicht weinen, sogar scherzen  
Mußt' ich, wie schon oft im Leben,  
Trotz der Qual in meinem Herzen.

Ziele, die ich mir erwählte,  
All mein Denken, Hoffen, Ringen,  
Wieviel stille, ungezählte  
Opfer mußte ich euch bringen!  
Auf die schönsten Jugendjahre  
Mußte weinend ich verzichten,  
Opfern sie auf dem Altare  
Streng gebieterischer Pflichten!

Und ich fühl' ein Feuer innen,  
Schmeichelnd lockt mich auch das Leben, -  
Etwas jagt mich stets von hinnen,  
Will ich mich der Lust ergeben, . . .  
Sollt' dem Schicksal nicht gefallen  
All mein Mühen, all mein Schaffen,  
Mag aus schönstem Erdenwallen  
Gleich der Tod hinweg mich raffен!

...

Ludwig Lazarus Zamenhof,  
Mia penso

Sur la kampo, for de l' mondo,  
antaŭ nokto de somero,  
amikino en la rondo  
kantas kanton pri l' espero,  
kaj pri vivo detruita  
ŝi rakontas kompatante, -  
mia vundo reŝrapita  
min doloras resangante.

„Ĉu vi dormas, ho sinjoro,  
kial tia senmoveco?  
Ha, kredeble rememoro  
el la kara infaneco?“  
Kion diri? Ne ploranta  
povas esti parolado  
kun fraŭlino ripozanta  
post somera promenado!

Mia penso kaj turmento  
kaj doloroj kaj esperoj!  
Kiom de mi en silento  
al vi iris jam oferoj!  
Kiun havis mi plej karon<sup>2</sup>  
la junecon - mi ploranta  
metis mem sur la altaron  
de la devo ordonanta!

Fajron sentas mi interne,  
vivi ankaŭ mi deziras, ...  
Io pelas min eterne,  
se mi al gajuloj iras ...  
Se ne plaĉos al la sorto  
mia peno kaj laboro ...  
Venu tuj al mi la morto,  
en espero ... sen doloro.

...

<sup>2</sup>anstataŭ „Kion havis mi plej karan“, kiel origine skribis Zamenhofo, pro la pli konvena rimparo „karon - altaron“.

*Traduko de la Esperanta poemo "Mia penso" de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14) en la Germanan de FRANZ ZWACH (\*1856-09-29 - †1928-03-21).*

*Arg-276-963 (2009-11-06 22:11:29)*

*Germanigo fare de Franz Zwach (29.09.1856 - 21.03.1928) de la origina internacilingva teksto de Ludoviko Lazaro Zamenhofo (Pri Franz Zwach vidu ankaŭ: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Franz\\_Zwach](http://eo.wikipedia.org/wiki/Franz_Zwach)).*

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-276-558 (2005-01-30 22:08:35)*